FN PER ANC 47

# ★ Normanda Esperanto Bulteno ★

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO N° 13
- AOUT 1970 -

Redaktas : S-ro E. Jouis - 62I, Rue Georges Mugnier - 76 - BOISGUILLAUME

Sendu la manuskriptojn antaŭ la 10-a de Februaro, 10-a de Majo, 10-a de Aŭgusto, 10-a de Novembro.

ENHAVO.

Normandaj Esperantistoj, revekiĝu.!!
Esperanto Ekspozicio en Le-Havre.
Kiel varbi kaj gardi lernantoj.
Subvencioj - Grava alvoko al la grupestroj.
Alvoko al ĉiuj Normandoj.
Dankesprimo de S-ino Hullin.
Estontaj rekontiĝoj kaj Kongresoj.
Vivo de la Grupoj.
Trikaĵo : Kiel triki longan kravaton.
Kotizoj.

## NORMANDAJ ESPERANTISTOJ, REVEKIĜU.!!!

Jam forpasis la ferioj, kaj nova studjaro komenciĝas. En multegaj lokoj de la mondo la Esperantistoj febre preparas (aŭ eĉ jam preparis de longe) sian labor-programon.

En Normandio, jam de pluraj jaroj, multaj grupoj ne plu havas kursojn, kaj iom post iom Esperanto malprogresas en nia provinco, kie ankaŭ (tio montriĝis en la Kongreso en Les Andelys), niaj samideanoj malpli kaj malpli emas al renkontiĝo kaj komuna laboro.

Kiu malsano atakis nian movadon en Normandio kaj regu-

le malkreskigis anaron de niaj Kongresoj?. Dum ili ĝenerale grupigis I20 aŭ I50 anojn antaŭ I5 jaroj, la kongreso en Yvetot havis nur 65 anojn kaj tiu de la Federacio en Les Andelys proksimume 45 anojn, el kiuj nur 8 partoprenis la Ĝeneralan Kunvenon de la Normanda.! Tamen ne mankas la Esperantistoj en nia provinco, kaj la nombro de la abonantoj al nia bulteno kreskis dum 2 jaroj. Do en kelkaj lokoj ankoraŭ vivas kaj eĉ prosperas nia Lingvo...., sed bedaŭrindetiuj lokoj estas tro malmultaj.

Tio devas ŝanĝi. Pli ol iam la mondo bezonas Esperanton. Tamen ne sufiĉas, ke io estas necesa, por ke ĝi disvastiĝu. Ankaŭ paco estas necesega kaj tamen militoj okazas en diversaj partoj de la mondo!. Eĉ la plej necesajn aferojn oni devas ofte trudi al la mondo, kiu ne ofte emas akcepti ilin, kaj rekonas ilian utilecon nur poste.

Koncerne Esperanton, tamen pro la laboro de la tieaj samideanoj, kelkaj landoj jam ekkomprenis ĝian neceson kaj eĉ, dum la pasinta jaro, oficialigis ĝian instruadon en la lernejoj, sed bedaŭrinde nedevige. En Francujo ankaŭ oficiale okazis ĉi-jare kursoj en Universitato de Clermont Ferrand. Sed tiuj sukcesoj estas ankoraŭ nesufiĉaj. Esperanto venkos nur per aktiva laboro de ĉiuj ĝiaj uzantoj, do, ankaŭ de la Normandoj!, kaj ĝi jam povus esti venkinta de longe se la Esperantistoj estus sufiĉe vigle laborintaj. Ne sufiĉas diri " Mi deziras ke Esperanto disvastiĝu"!. Se oni vere volas ion, oni agas konsekvence.

Mi do esperas, ke baldaŭ en Normandio, kiel ĉie malfermiĝos multaj novaj kursoj kun multaj adeptoj. Sed ne forgesu; ke oni povas varbi anojn nur per vigla kaj taŭga propagando. Kelkaj grupoj bone jam komprenis tion, ekzemple la Havra Grupo, kiu estas nun preparanta en la Urbodomo, grandiozan ekspozicion pri Esperanto; ĝia utilecon en komerco, turismo, filatelio k.t.p, ĝia literaturo kaj kultura valoro. Tiu ekspozicio verŝajne estos montrata poste en Yvetot kaj en Barentin kaj instigos la homojn aliĝi al la kursoj.

Kompreneble ne ĉiuj grupoj posedas sufiĉe da materialo por fari tion, sed ekzistas aliaj propagandrimedoj : Prelego pri Esperanto preferinde farata de eksterurba Esperantisto.(Neniu estas profeto en sia propra lando! ) kaj zorge anoncita per multaj afiŝoj, flugfolioj, gazet-artikoloj,k.t.p., ankaŭ bonege taŭgas por varbi kurs-

anojn se la parolanto, eĉ ne estante oratoro, sufiĉe bone konas la problemon kaj scias uzi konvinkigajn argumentojn.

Do ni ĉiuj eklaboru!!. Oktobro I970 devas vidi en Normandio la malfermon de multaj novaj kursoj kun dekoj da gelernantoj.

P. POTTIER

Vicprzidanto de U.N.E.

" GRAVA ESPERANTO-- EKSPOZICIO "

La Havra Grupo organizos, en la Honor-salono de la Urbodomo de la 3a ĝis la 7a de Septembro I970, de la 9a ĝis la I2H, kaj de la I4 ĝis la I9A horo, ekspozicion pri la temo :

" ESPERANTO EN FRANCUJO KAJ EN LA MONDO "

kiu montros la utilecon de Esperanto en - Komerco - Filatelio - Turismo - Literaturo - k.t.p.

Ĉiu Normanda Esperantisto nepre devas viziti tiun ekspzicion kies solena malfermo okazos la 3an de Septembro je la I9a horo, prezidata de la Urbestro.

Por subteni la Gravan laboron de la Havra Grupo, kaj por via propra informo.

VENU GRANDAMASE!!!..

<u>Rimarko</u>: Tiu ekspozicio eble estos ankaŭ videbla en Yvetot kaj en Barentin je datoj ankoraŭ ne fiksitaj.

---

KIEL VARBI , INTERESI KAJ GARDI NOVAJN LERNANTOJN?.

KIEL INSTIGI ILIN FARIĜI ESPERANTISTOJ?..

Pri tiuj temoj ni intencas publikigi en la venontaj numeroj de la Normanda Bulteno serion de artikoloj.

Por aperigi ilin, ni bezonas informojn. La personoj, kiuj jam okupiĝis pri tiuj problemoj estas do kore petataj sendi al la

redakcio de la Bulténo siajn ideojn kaj spertojn.

Antaŭan Dankon.

---

## SUBVENCIOJ

Grava atentigo al la grupestroj.

Ĉiu oficiale deklarita grupo povas pli malpli facile obteni subvencion de la urbestraro.

En Normandio, kelkaj grupoj regule ricevas sufiĉe fortan subvencion, ekzemple: Les Andelys - Le-Havre - Yvetot.

Tamen ŝajnas ke ankoraŭ multaj grupoj ne faris subvenciopeton, aŭ ne obtenis sukceson.

Ni atentigas vin, ke nuntempe, pro la baldaŭa reelektado de la urbestroj, tiuj ĉi ne emas al malkontentigo de siaj reelektontoj Pro tio, la cirkonstancoj estas ege favoraj al la peto de subvencion.

Profitu de la okazon !!!

---

## ALVOKO AL ĈIUJ NORMANDOJ

En Augsburgo kaj en Vieno, mi renkontis kun granda feliĉo kaj plezuro, Sinjoron Rytjkov. Mi aŭskultis lin dum liaj interesaj prelegoj kaj poste mi interbabilis kun li.

Li petis al mi sed ankaŭ al ĉiuj Esperantistoj skribi al tiu adreso " B.B.C. Londres. Britio; kaj ni devas sed koncize, postuli de tiu Radio, elsendojn en Esperanto.

Sinjoro Rytjkov mem, laboras en B.B.C. kaj asertis al mi ke, se multaj Esperantistoj petas tion, la estro de la B.B.C. povos akcepti kelkajn horojn de elsendaĵoj en Esperanto, ĉiusemajne, kaj memoru ke venontjare okazos en Londono la Kongreso de U.E.A. kaj ankaŭ en Parizo de S.A.T..

Konigu ke la Pola Radio dissendas ĉiutage multfoje en Esperanto.

Ni Normandoj, auskultas tre facile la B.B.C., tiamaniere la B.B.C. atentas multe pli pri niaj petoj.

ESTU MULTNOMBRAJ SKRIBONTAJ.

Se ni sukcesas, estos por la Esperanto Movado granda venko !!

Komprenebble, vi povas kolekti multajn subskribojn de la esperanto-simpatianoj.

Skribu rekte al: B.B.C. Londres. Britio.

PS. Vi povas samtempe peti informojn pri programo de la B.B.C. en Esperanto. Tiamaniere vi konstatos ĉu ili atentas al viaj demandoj, ĉu ne.!!

Mi dankas vin ege.

B. SAUNIER.

---

DANKESPRIMO. S-ino Hullin el Rouen, dankas la Unuiĝo pro la apero en la pasinta bulteno, de la artikolo pri la morto de sia patro nia bedaŭrata amiko S-ro Hullin el Honfleur.

---

KIUJN KONGRESOJN VI ĈEESTOS EN 1970-1971.

Multaj regionaj, naciaj kaj internaciaj Kongresoj okazos en 1970 - 1971.

Inter tiuj-ĉi, jen estas kelkaj, kiuj povos speciale interesi la Normandojn.

1°) Franca - Germana renkontiĝo en Amiens (11/10/1970) okazo de la ĝemeliĝo de Amiens kaj Dortmund.

Ni legas en Norda-Gazeto de Majo." Ni atentigu vin pri la invito de la Grupo Amiens-Esperanto al la proksima, Federacia kaj Franca-Germana renkontiĝo, kiu okazos en Amiens, dimanĉon 11-an de Oktobro. Tio estas oportuna okazo praktiki Esperanton kun eksterlandanoj.

2°) - Kongreso de U.N.E. Dum la generala kunveno de U.N.E. en la kadro de la Kongreso dela Normanda Federacio en Les-Andelys. La ĉeestantaro unuanime esprimis la deziron, ke la Kongresoj okazu nun ĉiu-jare. Kelkaj esprimis la deziron, ke la venonta kongreso okazu en Le - Havre, sed la Havra - Grupo, kiu nun faras gravajn klopodojn por disvatigi Esperanton en sia urbo, ne povas samtempe organizi kongreson ĉi-jare. Eble tiu grupo organizos kongreson en 1971 aŭ 1972.

Por reorganizi kaj reviglígi nian Unuiĝon, ni do bezonas kaj serĉas helpeman grupon, kiu bonvolus organizi Kongreson en 1971.

Antaŭan Dankon.

3°)- Kongreso de la Normanda Federacio .Gi okazos je dato ankoraŭ ne fiksita, sed nepre antaŭ Pasko en Mantes la Ville,

komune kun la Kongreso de la Pariza Federacio.

Detaloj pri tiu kongreso aperos en la venontaj numeroj de nia bulteno.

4°) - Nacia Kongreso de U.F.E. Ĝi okazos en Lyons, je Pasko 1971. Legu informojn en " Franca Esperantisto "

5°) - Kongreso de S.A.T.Amikaro : Ĝi okazos en Yvetot, je Pasko 1971.

Kotizoj ĝis la 31 de Januaro. Membro : 14 Fr
Gasto : 22Fr
Junulo de 15 ĝis 20 jaroj : duona prezo
Infano malpli ol 15- jara : senpaga ĉeesto.

6°) - Universala Kongreso de U.E.A.Ĝi okazos en Londono, de la 31a de Julio ĝis la 7a de Aŭgusto 1971.

Legu informojn en la Revuo " Esperanto".

7°) - Kongreso de S.A.T. Ĝi okazos en Parizo, de la 31a de Julio ĝis la 7a de Aŭgusto 1971. Legu informojn en " Senaciulo "

Oni povas ege bedaŭri, ke pluraj el tiuj kongresoj okazos samtempe

---

VIVO DE LA GRUPOJ.

-Lisieux. Pro la libertempa periodo, la aktiveco de la grupo ĉesis de la fino de Junio,ĝia lasta manifestado estis kunveno en Pont-Audemer, organizita de niaj tieaj Amikoj, Gesinjoroj Féret, la 28an de Junio, kiu arigis dekkvinon da partoprenantoj.

Post la vizito de la urbo, sub la gvidado de nia gastiganto kiu estis nin antaŭe akceptinta en sia domo, la restoracio " Le Pilon" ĝissate venkis nian apetiton.

Posttagmeze, la vico de aŭtomobiloj laŭiris la pentindan valon de la " Risle " rivero, ni atingis la riveregon " Sejno " ĉe " Quilleboeuf " kie ni disiĝis.

Tiu renkontiĝo naskis agrablan sekvon. Kelkajn Semajnojn poste, akceptinte Nederlandan Samideanon, Sinjoro Brans. Sro Féret kondukis lin ĝis Lisieux, kaj ni ĝuis Kelkhoran viglan babiladon. Reveninte Nederlanden Sro Brans laŭde raportis pri Normandio en loka gazeto.

Sro Martin.

Fecamp. Ĝis nun nenio nova

Sro Permanne.

Le - Havre. Ekzamenoj.

3 lernantoj sukcese trapasis la Ateston pri la Lernado: Sro Mardon, S-ino Peltier, S-ro Turmel

5 lernantoj sukcese trapasis la Ateston pri Supera Lernado F-ino Carron, F-ino Gaillard, S-ino Langlois, S-ino Peltier, S-ino Turmel

Inter-grupa renkontiĝo : La Esperantistoj el Le Havre kaj Yvetot renkontiĝis en Beuzevillette la 28an de Junio kaj pasigis kune agrablan tagon manĝante, kantante kaj ludante.

Ekspozicio : (vidu supre)

Kongreso : S-ino Lavallée partoprenis la U.K. en Vieno.

S-ino Peltier.

Yvetot. Ekzamenoj.

9 lernantoj sukcesis en la Atesto pri Lernado. S-ro Besnard S-ro Bucaille, S-ino Delcroix, S-ro Lecoufle, F-ino Lecoeur, S-ro Leheup, F-ino Leroux, S-ro Pottier Pascal, S-ro Pottier Thierry. Tiu lasta, aĝa nur je 8jaroj kaj duono, ricevis personajn gratulojn de Sinjoro Tardieu pro sia sukceso.

5 lernantoj sukcesis en la Atesto pri Supera Lernado: S-ro Bettencourt, F-ino Goddefroy, S-ro Goggefroy, F-ino Meunier, F-ino Patry.

2 kandidatoj prezentis sin al la Atesto pri Kapableco sed la rezultoj ne estas ankoraŭ konataj.

Sinjoro Saunier ĉeestis la Kongresojn EN Augsburg kaj Vieno

P. Pottier.

Vire La grupo havis la viziton de la U.E.A.; delegito en EXETER ( Anglujo.)

S-ro Legret.

Rouen. Post la lasta kunveno de la grupo kiu okazis la 19an de Junio, la partoprintoj decidis kunveni la 18an de Septembro je la 20 h 45, en la kutima ejo( Malnova Lernejo Renan, strato Marion, Sotteville.)

Plie, raportoj kun fotoj pri la tri Universala Kongresoj de S.A.T. - U.E.A. - T.E.J.O. estos prezentataj dum tiu ĉi kunveno.

Nepre venu multnombraj.

S-ro Lemarchand.

Les - Andelys . Raporto pri la U.K. en Vieno. ( BONNET Sylvie )

Miaj impresoj pri Vieno.

Mi ĝoje partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Vieno.

Ni alvenis aùtomobile pasante tra Germanujo kaj ni haltis poste en Salzburgo, belega urbo de Mozart, kie ni ŝatis la vidaĵon de la tre bela malnova kastelo.

Vendredonvespere, ni atingis Vienon kaj iris al nia loĝejo Post bona ripozo, mia fratino kaj mi iris sabaton al la Kongresejo por ricevi la diversajn dokumentojn. Tiun matenon, mi jam renkontis geamikojn, kiujn mi konis en la Kastelo Gresillon.

Dum la interkonatiĝa vespero, mi konatiĝis kun gejapanoj kaj Aùstralianino. Ni bone babilis kune.

Dimanĉon, la 2an de aùgusto I970, okazis la inaùguro de la 55 -a Universala Kongreso de Esperanto.

Tiu-ĉi inaùguro restos gravega en la historio de Esperanto kaj de la homaro. Fakte, la Prezidanto mem de la Aùsta Respubliko inaùguris la Kongreson. Li perfekte parolis la Internacian Lingvon kaj estis sufiĉe emocita. La prezidanto de U.E.A. profesoro Lapenna, dankis al li. Poste venis la salutoj de la oficialaj reprezentantoj el diversaj landoj, finfine la salutojn de la 45 landoj, kiuj partoprenis la Kongreson.

La Austra vespero estis tre agrabla.

La aliajn tagojn, mi partoprenis plurajn kunvenojn kaj tre interesajn ekskursojn en la ĉirkaùaĵo de Vieno. Ni ankaù vizitis la tre konatan kastelon Schonorunn.

Merkredon vespere, la balo estis tre plaĉa; kompreneble ni dancis multajn valsojn en Vieno.

Mi ankaù konstatis, ke la Danubo estas vere bluade la alta " Danubo-Turo ".

Sabaton matene, la solena fermo de la 55-a Universala Kongreso okazis en la granda salono Zamenhof de la kongresejo. ( Sofiensaal)

Ni ĉiuj estis kontentaj dum tiu Kongreso. Mi esperas reiri iun tagon al la bela lando Aùstrujo...kaj mi diras al vi "ĝis la revido en Londono" por la 56-aUniversala Kongreso.

Nun, iom da distro por la virinoj.

Longa Kravato ( nuna modo )

Levu 46 maŝojn (koloro B ), per dikaj trikiloj. Triku, en striata ĵerzo, I2 liniojn; 6 liniojn (k. C)I2 linioj (k.D), 6 liniojn(k.B) I2 liniojn (k.C) , 6 liniojn (k.B) I2liniojn(K.C), 6 liniojn (k.D) I2 liniojn (k.B); sed aldonante desktre kaj mallevante maldesktre unu maŝon je ĉiu dua linio.

Post 23 centimetroj, mallevu maldekstre I maŝonen ĉiu linio samtempe aldonu dekstre I maŝon ĉiun 4-an linion, kaj sekve ĝis kiam restas I4 maŝoj , daùrigu aldonante dekstre kaj mallevante maldekstre I maŝon ĉiun duan linion dum 4I cm.

Faru la duan flankon fronte al tiu-ĉi difinita.

F-ino Fercoq.

---

KOTIZOJ. -U.N.E. 2 Fr; Poŝtĉekonto: Union des Esperantistes de Normandie.
Rouen 283 - 40 E

La membroj de U.N.E., ricevas tiun bultenon.

U.F.E./U.E.A.

| | | | |
|---|---|---|---|
| U.F.E. | sen " Revue Française | | 6 Fr |
| | kun " " | | 30 Fr |
| U.E.A. | kun Jarlibro | | 23 Fr |
| " " | " " " | " " kaj "Esperanto " | 46 Fr |

Pagu al " Federation Normande des Centres Culturels d'Esperanto"
Poŝtĉekkonto Rouen 2348 - 06 Z

S.A.T.

kun Jarlibro kaj Sennaciulo 22 Fr
kun " " " kaj Sennacieca Revuo 27, 50
Pagu al S.A.T. Pĉk Paris I234-22

S.A.T.Amikaro Kun la bulteno I2 Fr
( + 0,50 por aliĝo aù adresŝanĝo)

Pagu al A. Delaye - p ĉ k Paris I445 - 02.

- Dépot légal, 3ème trimestre 70
La gérante - Mme Pottier.

Polycopié par le Centre Culturel d'Esperanto d'Yvetot.

Nun, iom da distro por la virinoj.

Longa Kravato ( nuna modo )

Levu 46 maŝojn (koloro B ), per dikaj trikiloj. Triku, en striata ĵerzo, I2 liniojn; 6 liniojn (k. C)I2 linioj (k.D), 6 liniojn(k.B) I2 liniojn (k.C) , 6 liniojn (k.B) I2liniojn(K.C), 6 liniojn (k.D) I2 liniojn (k.B); sed aldonante desktre kaj mallevante maldesktre unu maŝon je ĉiu dua linio.

Post 23 centimetroj, mallevu maldekstre I maŝonen ĉiu linio samtempe aldonu dekstre I maŝon ĉiun 4-an linion, kaj sekve ĝis kiam restas I4 maŝoj. , daŭrigu aldonante dekstre kaj mallevante maldekstre I maŝon ĉiun duan linion dum 4I cm.

Faru la duan flankon fronte al tiu-ĉi difinita.

F-ino Fercoq.

---

KOTIZOJ. -U.N.E. 2 Fr; Poŝtĉekonto: Union des Esperantistes de Normandie.
Rouen 283 - 40 E

La membroj de U.N.E., ricevas tiun bultenon.

U.F.E./U.E.A.

U.F.E. sen " Revue Française 6 Fr
kun " " 30 Fr
U.E.A. kun Jarlibro 23 Fr
" " " " " " " kaj "Esperanto " 46 Fr

Pagu al " Federation Normande des Centres Culturels d'Esperanto"
Poŝtĉekkonto Rouen 2348 - 06 Z

S.A.T.
kun Jarlibro kaj Sennaciulo 22 Fr
kun " " " kaj Sennacieca Revuo 27, 50
Pagu al S.A.T. Pĉk Paris I234-22

S.A.T.Amikaro Kun la bulteno I2 Fr
( + 0,50 por aliĝo aŭ adresŝanĝo)
Pagu al A. Delaye - p ĉ k Paris I445 - 02.

- Dépot légal, 3ème trimestre 70
La gérante - Mme Pottier.

Polycopié par le Centre Culturel d'Esperanto d'Yvetot.